


juna amiko

majo 2022 • n-ro 2/2022 (171)



PROGRESIGA REVUO
POR LEGANTOJ
INTER 10- KAJ
100-JARAĜAJ

△ *LUDE*: Unu amiko malnova pli valoras ol du novaj.
Konversaciaj temoj: Tago de disputoj. *Tra la mondo*:
Poŝtmarkoj ligas homojn. *Kantu kun Juna Amiko*: Literoj
kun ĉapelo. *Interkultura mondo*: Ukrainio esperas...
Laste: Fokoj kaj rokoj – trezoroj de la marbordo.



1) Lazo = kaptoŝnuro



Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Ahmad Reza Mamduhi, IR) 4

Konversaciaj temoj: Tago de disputoj (Judit Felszeghy, HU) 5



Tra la mondo: Poŝtmarkoj ligas homojn (Małgosia Komarnicka, PL kaj José de J Campos Pacheco, CU) 11

Kantu kun Juna Amiko: Literoj kun ĉapelo (Małgosia Komarnicka, PL) 12



Recenzo: Sandokan, la Tigro de Mompraĉem (Alesandra Madella, IT) 14

LUME: El mia kolo-ra vivo (Pavel Rak, CZ)..... 16



LUDE, la unika dua etaĝo: Unu amiko malnova pli valoras ol du novaj (Mónika Molnár, CH) 17



Vakcinoj: Louis Pasteur, patro de vakcinado! (Renée Triolle, FR) 19



Recenzo: Porinfana Libro-ludilo (Luiza Carol, IL) 21



Legu librojn – premioj – konkursoj: Tutmonda ĉefurbo de la libro. (Małgosia Komarnicka, PL) 22



Klubo de bona libro: Kie boacoj vagadas (Teresa Sibilak, PL)..... 23



Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo. Pollando: Vroclavo kaj



Jelenia Góra (Małgosia Komarnicka, PL) 23

Tra la mondo: Katmanduo (Jean-François Robert kaj Mireille Grosjean, CH) 27

Recenzo/Inter-vjuo: Du filmo-scenaroj, 2-a parto (Luiza Carol, IL/ José de J. Campos Pacheco, CU) 28



Interkultura Mondo: Ukrainio esperas... (Elena Nadikova, RU) ... 31



Legu kaj parigu! Kiom stultan ideon mi havis... (Mireille Grosjean, CH) 35



Krucenigmo: Oblikva krucenigmo kun kaŝita proverbo (Stano Marček, SK) ... 36



LASTE: Fokoj kaj rokoj – trezoroj de la marbordo (Stefan MacGill, NZ/HU) ... 37



Landaj perantoj 39

Eldonanto de *Juna amiko*: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). **Jura sidejo**: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejoj**: Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 154 (1972 ĝis 2018) publike legeblas ĉe: www.eventoj.hu/juna-amiko/. Vidu ankaŭ lernu.net kaj edukado.net.

Redaktoro: Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj**: Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio) kaj Utho Maier (Germanio). **Rubrikestroj**: Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo), José de Jesús Campos (Kubo), Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto**: Sebastian Cyprych, ilei.oficejo@gmail.com. **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en septembro 2022. **Limdatoj por sendi kontribuojn**: ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en t.n. A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekz. al la sama adreso). Reta varianto: A-lande € 11, B-lande € 7.

ISSN 0230 1318

Karaj amikoj!

Ni evidente forte kaj efike **esperis** kaj eĉ **kredis**, ke la koronviroza pandemio baldaŭ malaperos kaj ebligas al ni libere kontaktiĝi, ekskursi kaj renkontiĝi. Ke tio jam komencis okazi, vi povos konstati en tiu ĉi maja numero de nia *Juna Amiko*.

En la rubriko *Konversaciaj temoj* vi legos, ke dum kontaktiĝoj, ekskursoj kaj renkontiĝoj bedaŭrinde okazas ankaŭ miskomprenoj, kvereloj, disputoj kaj eĉ bataloj. Sed ankaŭ ke eblas pli bone kompreni unu la alian, strebi pri dialogoj kaj reciproka kompreno kaj repaciĝo. Esperanto ja estas lingvo de kompreno kaj paco sur la tero (laŭ Zamenhof).

Ke ankaŭ poŝtmarkoj reciproke ligas homojn kaj ke ekzistas eĉ Esperanto-Ligo Filatelista – Amika Rondo de Esperantaj-

Kolektantoj, vi legos en sekva artikolo. Ankaŭ kantoj, precipe tiuj Esperantaj, ligas nin kaj ebligas al ni amuze lerni nian lingvon – kaj nun eĉ viziti Kubon kaj la jubilean 10-an Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj en Pollando. Por kune festi la “Jaron de la Tigro” laŭ la ĉina kalendaro, vi konatiĝos kun libroj pri Tigro de Malajzio Sandokan, vi ekscios ion pri la patro de vakcinado Louis Pasteur, legos recenzon pri “Porinfana Libroludilo” kaj ekkonos Tutmondajn Ĉefurbojn de la Libro. Ne mankos legendoj, impresoj pri la nepala ĉefurbo Katmanduo, pri Ukrainio kaj Nov-Zelando, la “stulta ideo” de Mirejo, krucenigmo, la rubriko *LUDE* diras, ke unu amiko malnova pli valoras ol du novaj...

Aperas ankaŭ daŭrigo de la recenzo kaj intervjuo pri la du filmo-scenaroj kaj la gaja vivo de junaj lernantoj en Kubo.

– Agrablan legadon kaj bonan sanon deziras al vi

Stano Marček

Karaj legantoj!


Jam de ia tempo feliĉe ĉio, kio okazas tutmonde, iel kontribuas al pli rapida kaj pli efika disvastigo de Esperanto. Ekzemple, se antaŭe pro nia diaspureco ni vidis unu la alian unufoje jare, nun danke al la virtuala mondo ni povas ĉiutage ĝui Esperantujon. Sufiĉas ĵeti rigardon al la Eventa Servo (<https://eventaservo.org/>) kaj elekti el inter averaĝe pli ol 10 eventoj, kiuj okazas ĉiutage en nia rava Esperantujo.

Eĉ la pandemio okulfrappe ankaŭ helpis al nia movado, lertigante nin ĉiujn (inkluzive infanojn kaj oldulojn) por utiligi la virtualan mondon. La ĉeftemo de la lastatempa Irana Esperanto-Kongreso (IrEK-9), kiu okazis virtuale, estis “Pozitivaj influoj de la pandemio”. Pli ol triono el ties 31 prelegoj estis rekte pri tio – kaj nur dekono de la prelegantoj estis iranaj!



Sed kiel ni povas utiligi la novan virtualan mondon por la elementaj Esperanto-lernantoj? Delonge ni scias, ke la nombro de elementaj lernantoj de Esperanto, kiuj ne finas la kurson, aŭ ne daŭrigas la lernadon en pli altaj niveloj, estas multe pli altaj ol tiuj, kiuj lernas meznivelo aŭ progresige. Unu el la novaj ebloj por restigi ilin en Esperant(uj)o estas konatigi diverslandajn kaj diverslingvajn lernantojn unu kun la alia: tio praktike montras al ili tujan utiligeblecon de nia lingvo. Lastatempe mi tion atestis, observante tian komunan kunsidon de divers-landaj kaj divers-lingvaj lernantoj en elementaj kursoj de Esperanto. Espereble ILEI baldaŭ trovos rimedon aŭ mekanismon por pli sistemigi kaj pli multigi tiajn virtualajn kunsidojn, probable kadre de la projekto “Esperanto-kursaro Tibor Sekelj” (<https://www.espero.ir/eo/kursaro/>).

Ahmad Reza Mamduhi



Tago de disputoj

Help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

I. Iun matenon, en la kabineto de la direktoro de la banko, kie juna virino Emilia (E) laboras, ŝi babilas kun sia ĉefo (Ĉ):

E – Bonan matenon!

Ĉ – Bonan matenon! Kara koleginino, vi ja denove malfruis! La klientoj jam de dek minutoj staradas antaŭ via ĝiĉeto!

E – Mi tre bedaŭras, sed okazis, ke...

Ĉ – Ĉiam okazas io! Vi devus eliri el via hejmo je duonhoro pli frue! Se vi ankoraŭ plian fojon malfruos, vi ricevos je duontaga laboro malpli da salajro!

E – Pardonu, sed mi deziris nur diri, ke...

Ĉ – Min ne interesas, kion vi volas diri! Min interesas, ke la kunlaborantoj

estu akurataj! Bonvolu tuj iri al via loko, Emilia!

II. En la sama banko, unu horon poste, diskuto inter Emilia (E) kaj kliento (Kl), mezaĝa viro:

E – Mi petas la sekvan! Bonan tagon!


Kl – Estas vere nekredeble, kion via banko faras! Mi tuj volas tion diri al la direktoro!

E – La direktoro nun ne estas atingebla, sed eble mi povas helpi vin. Diru, kio estas via problemo!

Kl – Mia problemo estas tio, ke aŭ via banko konsideras ĉiujn klientojn kretenoj, aŭ vi estas kretenoj!

E – Nia banko estimas siajn klientojn, sinjoro. Sed, kio estas via problemo?





Kl – Kio estas mia problemoj?! Ĉu vi eĉ ne scias pri tio?!

E – Se eble vi bonvolus rakonti tion...

Kl – Ĉu nun estas vi, kiu malpacienas? Mi staras en la vico, en tiu ĉi damna banko, jam preskaŭ de unu horo kun mia problemoj! Mi volas tuj renkonti la direktoron! Sendu al mi la direktoron! Tuj!

E – (*Mallaŭte, en la telefonon*): Karlo, ĉu vi havas kelkajn momentojn liberajn? Tre bone, kuru nun al mi, mi petas, kaj estu la direktoro por tiu ĉi kliento. Ne, mi ankoraŭ ne scias, kion li volas, kio estas lia problemoj, sed li estas ege kolera. Jes, certe. Dankon!

III. En la sama banko, unu horon poste, diskuto inter Emilia (E), kiu babilas kun sia juna kolego, Karlo (K):

E – Dankon, Karlo, por via helpo! Tiu ĉi ulo jam vere estis tro multe ĝena por mi. Precipe post la riproĉo de la direktoro, li eĉ ne aŭskultis min!

K – Kio estis problemoj de la ĉefo?

E – Mi malfruis. Fakte, tio jam okazis. Sed mi vivas sola, matene mi unue devas veturigi mian filon al la lernejo, li estas ankoraŭ seĝara, mi ne deziras lasi lin sola marŝi inter la veturiloj! Kaj hodiaŭ lia instruistino lasis por mi telefonan mesaĝon, ke ŝi volas paroli kun mi. Mi atendis dek minutojn kaj plie mi jam ne povis. Alveturinte al la banko, mi rimarkis, ke iu parkumas en mia loko. Nia banko almenaŭ certigas por siaj kunlaborantoj senpagan parkumadon, sur la pavimo indikitaj estas la trafiknumeroj de la aŭtoj, kaj tamen iu senrespekte okupas la lokon! Kion mi povas fari? Mi devis trovi alian lokon, sufiĉe malproksime.

K – Ĉu vi scias, kiu okupas vian parkumejon?

E – Certe ne, sed mi notis la trafik-

numeron, kaj lasis tie bileton ĉe la glacoviŝilo. Jen, rigardu, mi fotis ĝin, kaj videblas ankaŭ la trafiknumero.

K – (*Legante laŭte*): Estimata Stiristo! Eble vi ne rimarkis, ke vi starigis vian aŭton sur loko luprenita kaj pagita de la banko. Refoje mi anoncos tion al la polico, kaj vi povos rehavi vian aŭton nur pere de ĝi! – Bone vi reagis, Emilia, vi ja pravas!

E – Mi estis jam vere tre nervoza! Do, finiĝis la manĝopaŭzo, ni reiru labori!

IV. En la sama tago, posttagmeze, Emilia (E) havas disputon kun la Instruistino (I) de sia filo, Henriko (H):

E – Saluton, mi estas la patrino de Henriko. Ĉu vi deziras paroli kun mi?

I – Jes, saluton, Patrino. Nuntempe estas problemoj pri via filo. Li ŝajne ne





bone kondukas inter siaj samklasanoj.

- E – Mi ne komprenas, sinjorino Instruistino. En la infanĝardeno li estis inter la plej ŝatataj kaj de la edukistoj, kaj de la aliaj infanoj. Li nur de kelkaj monatoj estas lernejanjo.
- I – Ĝuste tial mi volis tion rimarkigi! Se jam komence iu ne bone adaptiĝas al la aliaj, tio kaŭzos eĉ pli da problemoj poste.
- E – Fakte, kio estis la problemoj pri Henriko?
- I – Krom tio, ke li ĉiam kontraŭdiras al mi, kaj pri ĉio li demandadas, hieraŭ li kaŭzis gravan vundon al alia knabo.
- E – Kiel do?
- I – Vidu, Patrino, li verŝajne ne rakontis tion hejme! Tio montras, ke li eĉ ne estas sincera al siaj gepatroj!
- E – Permesu, kara Instruistino, ke mi

mem, la patrino, decidu, kia li estas. Cetere, estas nur mi, li ne havas patron.

- I – Eble ankaŭ la manko de patro influas lin malbone.
- E – Prefere bonvolu rakonti, kiel okazis la vundo.
- I – La patrino de tiu knabo preskaŭ plorante plendis al mi, ke Henriko tiel forte pugnobatis lin, ke la knabo eĉ falis pro la bato, kaj vundis sian kubuton.
- E – Ĉu vi montris la vundon al la kuracisto?
- I – Ne, ĉar tio okazis jam ekster la lernejo, survoje. La patrino de tiu knabo rimarkis tion jam hejme, kaj ili rapidis al la kuracisto.
- E – Ĉu okazis frakaso de la ostoj?
- I – Laŭ miaj informoj ne, sed la vundo tamen sangis. Kaj tion kaŭzis via filo!
- E – Mi bedaŭras pri tio, bonvolu doni al mi la nomon kaj la telefonnumeron de la patrino, mi vokos ŝin, kaj pardonpetos!
- I – Tio estas la minimumo, Patrino. Kaj mi proponas al vi zorgi pri pli taŭga edukado de via filo!

V. En la sama tago, hejmenirante el la lernejo, Emilia (E) babilas kun sia filo, Henriko (H):

- E – Mi estas ege trista pro vi! Vi ne tion promesis al mi!
- H – (*Silentas.*)
- E – Kiel malbela kaj kruda afero estis tiel bati la kompatindan knabeton, kaj li eĉ falis, kaj vundis sin! Kial vi batas iun pli malfortan ol vi?
- H – (*Silentas.*)
- E – Se vi havas problemon kun iu, diru tion ĉu al la sinjorino instruistino, ĉu al mi! Tiel mi ne estus envokita al via lernejo por aŭskulti plendojn





pri vi! Mi estis ŝokita kaj estis ege malagrabla por mi. Hieraŭ vi diris nenion al mi, kiam mi demandis, kiel estis en la lernejo!

H – (*Silentas, intertempe ili alvenas hejmen.*)

E – Nek via patro, nek mi iam ajn batis vin! Ĉu vi scias, kial? Ĉar oni ne batu tiun, kiu estas malpli forta! Hontu pri tiu fia ago, Henriko!

H – (*Dum vespermanĝo.*) Panjo, ĉu vi koleras pri mi?

E – Jes!

H – Ĉu vi scias, kial mi pugnobatis Peĉjon?

E – Peĉjon?

H – Jes, tiun knabon... Ĉar post la lernejo li etendis sian kruron, antaŭ la piedojn de Marika. Tion mi ja vidis, ĉar ili marŝis ĵus antaŭ mi. Marika falis, kaj Peĉjo ridaĉis. Kaj tiam mi aliris al li, kaj pugnobatis lin.

E – Mi komprenas vin, sed vi tamen ne rajtas fari tion. Kaj kion diris tiu Marika?

H – Nenion.

VI. En la hejmo de Emilia, iom post noktomezo, Emilia (E) kaj Karlo (K), ŝia kolego, babilas:


(Sonorigo ĉe la pordo)

E – (*Al si mem, duondorme.*) Ho! Ĉu jam mateno? Damne! Pasis nur noktomezo! Kiu idioto sonoras en tiu tempo?! Eble erare! Nekredeble! Tio eĉ vekos la infanon! Diable! (*Alirante al la pordo:*) Ion... iun ilon mi tamen bezonas... La tranĉilegon!

E – (*Malŝlosinte la pordon.*) Karlo?! Kiel? Kion vi volas ĉi tie meze de la nokto?

K – Mi ne scias, kiel mi pardonpetu,





Emilia... se vi ne trapikos min per tiu tranĉilego!

E – Sed kial vi...?

K – Mi povas iri nenien... Mia sola amiko ankoraŭ ferias eksterlande... Miaj gepatroj vivas province... Mi demandis kelkajn hotelojn, sed ili ne havas liberan ĉambron, aliaj ne respondis... Mi demandas vin, ĉu mi rajtas tranokti ĉe vi?

E – Certe, envenu do. Ĉu vi perdis vian ŝlosilon?

K – Ha, mi perdis mian bonhumoron.

E – Do, sidigu tamen. Ĉu vi volas rakonti, kio okazis?

K – Vi tion scias, ĉu, ke mi loĝas kune kun mia amikino? Ŝi forgesis sian telefonon en la loĝejo. Ĝi sonoris, mi volis respondi, sed tuj vira voĉo demandis: "Ĉu vi estas nun sola, mia museto?" Mi rakontis tion al mia amikino.

Eĉ, mi aldonis, se ŝi deziras, ŝi rajtas plu vivi kun sia kato.

Ŝi ĉion neis, kriegis, ploris, sakris... do, mi ne plu emis aŭskulti tion, mi prenis miajn plej gravajn aĵojn, kaj komencis serĉadi eblon por tranokti.

E – Kaj nun, kion vi faros?

K – Mi luprenos loĝejon. Morgaŭ mi malmendos la alian loĝejon. Por esti sincera, tion mi ne aparte bedaŭras. Nia rilato jam delonge ne funkcias kontentige.

E – Mi preparos por vi la kanapon. Vi povas resti ĉe ni, ĝis vi deziras.

K – Mi eĉ ne scias, kiel mi danku pro tio al vi, Emilia!

E – Ho, mi povas proponi ion al vi: morgaŭ veturigu Henĉjon al la lernejo! Li ĝojos pri tio, kaj mi almenaŭ ne renkontos la instruistinon.

Vortklarigoj:

Pavimo: kovrita parto de la tero, per ŝtonoj, brikoj, cemento, ktp.

Trafiknumero: ŝildo sur la antaŭa kaj malantaŭa partoj de survojoj veturiloj, kiu per literoj kaj ciferoj montras, al kiu apartenas la veturilo.

Glacoviŝilo: moviĝanta braketo kun gumo por purigi la fenestrojn de aŭto.

Minimumo: plej malgranda atingebla parto.

Sakri: esprimi koleron per maldecaj vortoj.

Taskoj:

- I. a. Legu laŭte la dialogojn unuope, kaj klopodu kompreni ĉion!
- b. Notu la vortojn, kiuj rilatas al riproĉo, disputo, kaj aparte la vortojn, kiuj rilatas al bedaŭro kaj pardono!
- c. Post plia legado rakontu en via gepatra lingvo, pri kio temas en la unuopaj dialogoj!
- II. a. Rakontu, laŭte kaj en Esperanto, kio okazas en la unuopaj dialogoj!
- b. Preparu daŭrigojn por la dialogoj, tiel, ke la partoprenantoj repaciĝu!
- c. Rakontu iun okazon, kiam vi havis disputon kun iu. Vi povas priskribi ankaŭ elpensitan disputon!
- d. Post kelkminuta sin-preparo dialogu kaj disputu kun via partnero pri la sekvaj temoj:
 1. Aĉetanto reportas varon en la vendejon, pro malbona kvalito,
 2. Veturanto en aŭtobuso (metroo, tramo, ktp) ne havas bileton, kaj ne volas pagi monpunon.
 3. Stiristo veturas pli rapide ol la permesata rapideco, kaj policano haltigas la aŭton.
 4. Inter geedza paro, pro la malbonaj lernejoj rezultoj de ilia infano.
 5. Inter patrino kaj infano, ĉar la infano ne volas manĝi legomaĵojn.






Poŝtmarkoj ligas homojn

Karaj Legantoj de *Juna Amiko*, ĉu vi iam konsideris, kiuj kaj kiom da fabeloj troviĝas sur la poŝtmarkoj?

Tiun demandon skribis al mi José de J Campos Pacheco el Kubo, la longdaŭra kunlaboranto de nia revuo. Ni do ambaŭ komencis iomete esplori la temon. Ni trovis multajn interesajn informojn kaj volas dividiĝi kun vi. Nia unua celo estis prezenti al vi poŝtmarkojn kun bildoj de fabelherooj, sed tre rapide okazis, ke ili estas multegaj preskaŭ en ĉiu lando. Tial ni decidis limigi tiujn informojn al la plej konataj herooj kaj prezenti al vi aliajn novaĵojn laŭ ni vere gravajn.

Ĉiu el ni certe bone scias, ke poŝtmarko estas papera, havas difinitan valoron en valuto kaj ĝin ni gluas sur leteran koverton. Tamen, ĉu vi scias, ke la poŝtmarkoj havas diversajn formojn kaj ili estas ortangulaj, kvadrataj, sed ankaŭ triangulaj, ovalaj kaj eĉ kvinangulaj? Ankaŭ materialoj, el kiuj oni produktas poŝtmarkojn, estas diversaj



kaj oni uzas ne nur paperon, sed ankaŭ folion, plaston kaj lignon.

Ĉiujare la 9-an de oktobro oni festas *Mondan Tagon de Poŝtmarko*. Fondis ĝin Universala Poŝta Unio – internacia organizaĵo, kiu kunordigas la tutmondan poŝtan sistemon. La organizaĵo de la jaro 1947 fariĝis specialigita institucio de Unuiĝintaj Nacioj. Universala Poŝta Unio elektis kiel sian oficialan lingvon la francan kaj ĝia ĉefsidejo troviĝas en Svislando, en Berno. Tie vi povas admiri la monumenton pri la universala poŝto (la suba bildo).



Multaj el ni dum infanaĝo kolektis poŝtmarkojn kaj kelkaj daŭrigas la kolektadon kaj fariĝas filatelistoj. Tamen por fariĝi filatelisto oni devas dediĉi al tiu tasko multe da tempo kaj interesiĝo. Komence, kiam ni komencas kolekti, ni faras tion iom kaose, ĉar ni kolektas la poŝtmarkojn pri diversaj temoj. Nur poste ni komencas prilabori propran sistemon de la kolektado, ekz. laŭ la lando, kategorio, grandeco, aŭ laŭ infanherooj, kiujn ni konas el la libroj, legendoj, filmoj aŭ rakontoj... En multaj landoj oni eldonas poŝtmarkojn ankaŭ kun legendoj aŭ fabeloj kaj tio ja estas grava branĉo, ĉar tiel estas prezentata kulturo, kutimoj kaj naciaj valoroj de la lando. Tial



kolektado kaj prezentado de la poŝtmarkoj donas al ĉiu filatelisto aŭ kolektanto multege da ĝojo kaj emocioj. Ni ja povas reveni al nia infanaĝo, kiam ni jam estas plenkreskuloj aŭ pliaĝuloj, kaj rigardi poŝtmarkojn kun fabelherooj, kiuj hodiaŭ estas ŝanĝitaj je aliaj. Por multaj plenkreskuloj konataj estas la poŝtmarkoj kun *Pinokjo*, *Miĉjo Muso*, *Donaldo Anaso*, *Pluto Hundo*, *Fingrulino*, sed ankaŭ kun herooj de naciaj fabeloj aŭ rakontoj kiel *Lolek kaj Bolek* en Pollando, *La reĝa simio* en Ĉinio, *La ora aĝo* en Kubo. Tamen por la nuntempa juna generacio jam estas konataj aliaj fabelherooj.

Kolektante informojn pri poŝtmarkoj ni ankaŭ rimarkis alian ege gravan valoron de filatelo kaj do kolektado kaj sciaĵaro pri la poŝtmarkoj (laŭ *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*).

Rigardante poŝtmarkojn kun infanoj, ni ofte sidas hejme kaj tiel vizitas nekonatajn angulojn de la mondo. Ĉeokaze ni multe interparolas, rakontas, klarigas kaj kreas esceptan etoson kun niaj aŭskultantoj. Tiel komenciĝas eduka rolo de la poŝtmarkoj.

Montrante al infanoj la diversecon kaj belecon de poŝtmarkoj, ni vekas en ili scivolemon pri la mondo. Plej facile estas fari tion pere de la poŝtmarkoj kun ŝatataj herooj. Infanoj ja ŝatas fabelojn. En fabeloj la bono ĉiam venkas, la vivo estas pli kolora kaj bestoj aŭ ludiloj parolas la homan voĉon. Tio estas tre valore pasigita tempo. Ofte danke al la poŝtmarkoj ni ekkonas heroojn de fabeloj, pri kiuj ni



forgesis... Parto de tiu escepta fabela mondo estas fermita en poŝtmarkoj, kaj se ni ilin kolektas, ni konservas ankaŭ parton de nia infaneco. Ja fabeloj estas en ĉiu kulturo kaj ili estas ĝia grava elemento.

La poŝtmarko, prezentante interesan historion, helpas eduki, profundigi sciojn, ekkoni diversecon de fabelaj siluetoj, kaj ĝi permesas libere interparoli pri etikaj normoj, principoj kaj pri tio, kio estas bono kaj kio estas malbono. Instruado kaj lernado pere de la poŝtmarkoj pligrandigas interesiĝon, alloguecon kaj ankaŭ efikecon de edukado.


Pri poŝtmarkoj oni eldonis multajn

librojn. Unu el ili kreis kuba verkistino kaj ĵurnalistino Lucia Caridad Sanz Araujo. En ŝia libro *Pasaporte a la fantasia* estas priskribitaj la poŝtmarkoj kun herooj de la infana kaj junulara literaturo (la suba bildo).

En nia Esperantujo estas ankaŭ filatelista Esperanto-organizaĵo. Ĝi nomiĝas Esperanto-Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj, mallonge ELF-AREK (www.esperanto.cc/kolektado/). La organizaĵo estis fondita en la jaro 1996 kaj informas pri Esperantaj filatelajoj kaj glumarkoj, sed ankaŭ pri Esperanto. La informilo de la organizaĵo nomiĝas *La Verda Lupeo* (www.bitarkivo.org/gazetoj/verdalupeofenikso) kaj informas pri atingoj de siaj membroj.

La poŝtmarkoj ligas homojn el la tuta mondo, senkonsidere pri iliaj kulturo, kutimoj, lingvo, religio, ideoj...

Małgosia Komarnicka kaj José de J Campos Pacheco





La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.

Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝigon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti – kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugeste alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas fremdan lingvon. La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

José de Jesús Campos Pacheco el Kubo, longdaŭra kunlaboranto de *Juna Amiko*, proponas brazilan kanton kun la vortoj de Sylla Chaves “*Literoj kun ĉapelo*”. La kanto devenas el la libroj “100 jaroj de kantado” – *Kultura Kooperativo de Esperanto 1989* kaj “*Esperanto por Lernejoj Klasoj*” – Vol. 1 (Josias Barboza) 2008; www.brazilakolekto.com/2019/01/literoj-kun-capelo.html?m=0

Mi ĉi-okaze invitas vin partopreni en la jubilea, **10-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj**. Pri ĝi vi legos sur alia paĝo de nia revuo.

Literoj kun ĉapelo

1. Se la litero kun ĉapelo estas la litero Ĉ, kiam mankas la ĉapelo ĝi fariĝas C.
2. Se litero kun ĉapelo estas la litero Ĝ, kiam mankas la ĉapelo, ĝi fariĝas G.
3. La ĉapelo en ĝentila ĴAŬDO, ĤORO, ĈU kaj ŜI estas vere tre facila por mi kaj por vi.
4. Se litero kun ĉapelo estas la litero Ĵ, kiam mankas la ĉapelo, ĝi fariĝas J.
5. Se litero kun ĉapelo estas la litero Ŝ, kiam mankas la ĉapelo, ĝi fariĝas S.



Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej



Literoj kun ĉapelo

(Originala titolo: *Eu sou pobre, pobre, pobre -aũ- De marré de ci*) Tradicia Versio: Sylla Chaves

C

Se li - te - ro kun ĉa - pe - lo es - tas
 Se li - te - ro kun ĉa - pe - lo es - tas
 La ĉa - pe - lo en ĜEN - TI - LA, JAŬ - DO,
 Se li - te - ro kun ĉa - pe - lo es - tas
 Se li - te - ro kun ĉa - pe - lo es - tas

4 G7 C

la li - te - ro ĉi, ki - am man - kas la ĉa -
 la li - te - ro Ĝi, ki - am man - kas la ĉa -
 HO - RO, ĈU kaj Ŝi es - tas ve - re tre ĉa -
 la li - te - ro Ĝi, ki - am man - kas la ĉa -
 la li - te - ro Ŝi, ki - am man - kas la ĉa -

7 G7 C


pe - lo ĝi fa - ri - ĝas C.
 pe - lo ĝi fa - ri - ĝas G.
 ci - la por mi kaj por vi.
 pe - lo ĝi fa - ri - ĝas J.
 pe - lo ĝi fa - ri - ĝas S.

Ĉ Ĝ Ĥ Ĥ Ŝ Ŭ

Mi kun José preparis por la legantoj de nia revuo enigmon: provu solvi ĝin, respondante demandojn per unu vorto (ĉiu vorto komenciĝas per litero kun ĉapelo):

1. Bongusta negranda ruĝa frukto kun unu kerno.
2. Mara transportilo.
3. Ni surmetas ĝin por protekti kapon.
4. Loko, ofte apud domo, kie oni kulturigas kreskaĵojn por plezuro aŭ profito.
5. Besto kun eksterordinare longa kolo.
6. Kvara tago de la semajno. Nun, el ĉiu vorto elektu ĝustan literon kaj kreu unu novan vorton, kiu ligiĝas kun Esperanto.

La brazila verkisto kaj pedagogo Sylla Chaves (1929-2009) forpasis la 30-an de majo, nur tri tagojn antaŭ sia 80-jariĝo. Li studis juron, komunikadon, kibernetikon kaj politikan sciencon. Li laboris ĉe UN en Novjorko kaj Unesko en Parizo kaj profesoris en la



Brazila Lernejo pri Publika Administrado. Chaves lernis Esperanton en la 30-jaroj kaj ekaktivis en 1946. Li estis prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo 1978-82. Laŭ la artikolo: Sylla Chaves forpasis / Gazetara komuniko de UEA; www.liberafolio.org/arkivo/www.liberafolio.org/2009/sylla-chaves-forpasis/

La konkursa tasko:

Sendu respondon de la enigmo (kun ĉiuj vortoj) kaj kreu po du demandoj al ĉiu strofo de la kanto. Sendu ilin rete ĝis la 30-a de majo 2022 al mia retadreso.

Atendas vin premioj, kiujn fondis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, www.ecem.com.pl

Kantu kaj lernu!


Bonvolu sendi al mi proponojn de viaj naciaj kantoj, ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo: *malgosia*. junaamiko@gmail.com

Sandokan, la Tigro de Mompraĉem

Por festi la komencon de la jaro de la tigo laŭ la ĉina kalendaro, ni povas memori aventuran heroon je tigra karaktero, tre amatan de italoj kaj multe da aliaj homoj tra la mondo.

Temas pri la bela, longhara, kuraĝa kaj grandanima pirato Sandokan, protagonisto de la barat-malaja ciklo de aventur-romanoj el la plumo de Emilio Salgari (1862-1911). La itala verkisto, fakte, kromnomis sian heroon "Tigro de Malajzio" aŭ "Tigro de Mompraĉem" el la nomo de la duonvera kaj duonfantazia insulo en la malaja insularo. Ĝi estas la nekonkerebla rifuĝo de Sandokan kaj de liaj piratoj, la aŭdacaj kaj pluretnaj "Tigridoj", kiuj estas pretaj sekvi sian junan estron ĉien. Ilia plej granda honoro estas protekti lin per sia korpo ĝismorte dum la plej danĝeraj bataloj.

Tri tigraj kapoj kun malfermitaj faŭkoj ornamas ruĝan flagon de Sandokan kaj sentigas timon al malamiko. Kiel tigo, li ne



hezitas sola ataki multnombrajn armatajn virojn, sed li same kapablas sin kontroli kaj resti kaŝita en la ombro, se ne estas ŝanco venki. Simila al sovaĝa besto, li estas forta, svelta kaj proksima al la naturo, kiun li konas tre bone. Eĉ vundita kaj febrohava, li kapablas sin savi en la ĝangalo kaj pretervivi per ĝiaj fruktoj. Li soifas je sango, sed

lia venĝo nur celas la anglajn, nederlandajn kaj hispanajn koloniistojn, kiuj forprenis lian regnon kaj mortigis liajn patrinon kaj gefratojn. Male li donacas manplenojn da diamantoj al ĉinaj maristoj, kiuj sin defendas honorplene de liaj atakoj. Kaj li protektas el perfortoj kaj ekspluatado la lokajn loĝantojn, kiuj dankeme helpas lin kaj liajn homojn.

La sola malforta punkto de Sandokan estas lia romantika koro. Preskaŭ kiel heroo de

itala opero, li neeviteble enamiĝas kontraŭ sia volo je la nevino de brita malamiko, eĉ sciante, ke tiu amo endanĝerigos ĉiujn liajn revojn kaj kredojn. Fakte, la deksejara belulino Marianna estas nur parte brita, ĉar ŝi naskiĝis sub la vulkano kaj la lazura ĉielo de Napolo en suda Italio, el kie venis ŝia patrino. Ekde ŝia junaĝo, ŝia oficira onklo konigis al ŝi la malkomfortojn de la marista kaj soldata vivo. Sed ŝi mem lernis la inajn delikatajn artojn, tiel ke ĉiuj nomas ŝin la "Perlo de Labuan". Sandokan, pli aĝa ol ŝi je 10 jaroj, estis jam allogita de ŝia famo antaŭ ol vidi ŝin. Sed li estas tutanime kaptita, kiam ŝi kuracas liajn vundojn kaj sentime reciprokas lian amon. Li ne hezitas lukti kun tigo nur per sia kriso (*malaja ponardo*) por impresi ŝin. Kaj li






klopodas ĉiumaniere forrabi ŝin de Mompraĉem, kvankam li konscias, ke tio povus signifi la finon de lia pirata kariero kaj tute malebligi lian venĝon.

Sandokan kaptis la imagkapablon de italaj geknaboj ekde sia unua apero en 1883 sur la paĝoj de ĵurnalo de la nord-itala urbo Verona, kie Salgari naskiĝis kaj laboris kiel kronikisto. La unua libro de la ciklo estis publikigita en 1900 sub la titolo “La Tigroj de Mompraĉem” (itale “*Le Tigri di Mompracem*”). Sekvis deko da sukcesaj aventur-romanoj fare de la sama aŭtoro kaj pliaj fare de lia filo Omar kaj aliaj ĝis post la dua mondmilito. En 1976 la itala reĝisoro Sergio Sollima realigis miniserion pri Sandokan, kiu restas ankoraŭ nun la plej vidita programo en la historio de la itala televido kaj estis vaste sukcesa ankaŭ eksterlande. Ĉefrolis en ĝi la barata aktoro Kabir Bedi, kiu iĝis tre fama en Italio kaj eĉ lernis paroli la italan. En 2010 la hispandevena meksika verkisto Paco Ignacio Taibo II reprenis la rakonton kaj la heroojn de Salgari en sia libro “La reveno de la tigroj de Malajzio” (hispane “*El retorno de los tigres de la Malasia*”). Por tiu engaĝita aŭtoro, kiu verkis interalie biografion de Ernesto Che Guevara kaj eseon pri la historio de komunismo en Meksikio, Sandokan ĉiam reprezentis la plej pasian kaj entuziasman formon de kontraŭ-imperiismo kaj la nun maljuniĝintaj piratoj povas ankoraŭ efike lukti por tiu kaŭzo.

Salgari vivis samtempe kun aliaj eŭropaj verkistoj pri aziaj landoj, kiel Joseph Conrad (1857-1924), kiu vojaĝis kiel maristo al Borneo kaj Malajzio, aŭ kiel Rudyard Kipling (1865-1936), kiu naskiĝis en Barato kaj longe loĝis tie. Sed la itala verkisto, kiu devis forlasi siajn studojn por iĝi kapitano por transmaraj vojaĝoj, neniam iris pli malproksimen ol Brindisi, havenurbo en suda Italio. Li trovis inspiron en la ekzotika modo, sed li ĉefe solece esploris en bibliotekoj kaj muzeoj, kiel tiu pri Natura Historio en Torino. En tiu norditala urbo, kiu gastigos la Universalan Kongreson de Esperanto en 2023, li fakte pasigis la lastajn jarojn de sia vivo, kune kun




sia familio kaj grupeto de aliaj malriĉaj, drinkemaj kaj ŝercemaj artistoj, popolo konataj kiel “bohemo”.

En niaj nunaj jaroj de pandemio homoj devis alktimiĝi nur revii pri foraj vojaĝoj, kiuj ofte estas neeblaj aŭ tro malfacile realigeblaj pro la mondaj sankondiĉoj. Eble pro tio verkisto je nehaltigebla imagkapablo kiel Salgari iĝis denove tiel populara. Nova eldono de la romanoj de Sandokan aĉeteblas en italaj ĵurnal-vendejoj ekde somero 2021. Kaj ekde februaro 2022 la itala televido komencis realigi modernan daŭrigon de la fama serio kun la turka aktoro Can Yaman kiel ĉefrolulo kaj pli da atento al la ina vidpunkto en la pentrado de tiu am-rilato inter Eŭropo kaj Azio. Espereble la forto de la Tigro de Malajzio helpas nin sekure vidi la finon de la koronvira pandemio en la nova jaro de la tigro laŭ la ĉina kalendaro kaj imagi pli justan mondon, por pli pozitive interkonektata estonto.



Alessandra Madella

(El <https://esperanto.cri.cn/>)



El mia kolora vivo


Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn kaj bestojn! Kie ili estas? Kion ili faras? Kiujn vestaĵojn portas la homoj? Kiom da diferencoj vi trovis?

Unu amiko malnova pli valoras ol du novaj

La rubrikon prizorgas: Mónika Molnár



Post la gastado de Onklo Vojaĝemulo la Uletoj revis pri vojaĝoj, pri aventuroj, pri agrablaj aferoj.

Scivolemulido, kiu ĉiam volis scii ĉion, demandis al la aliaj: – Kio pli bonas ol konstrui la lokon de viaj revoj kaj poste vojaĝi tien?

Kaj la respondo ne malfruis de siaj amikoj:

– Konstrui la lokon de viaj revoj kaj poste vojaĝi tien kun via plej bona amiko! Ĉu vi vidis sur la frontpaĝo la du geamikojn, Olga kaj Nathan, kiuj konstruis belan lokon?

– Jes! – diris

Scivolemulido. – Ĉu ili poste vojaĝos kune por atingi tiun lokon?

– Mi ne scias. – diris

Kaŝemulido. – Sed mi scias kial ili konstruis ĝin! Ĝi estis belega enigmo dum la

Malferma Tago de ilia lernejo, La Granda Ursino en Svislando. Ilia demando estis:

“Kiom da elementoj ni uzis por nia konstruaĵo?” Ĉu vi povas diveni ĝin?

Provu! Poste vi povas kontroli vian respondon fine de la sekva paĝo. Bonaj amikoj faras multajn belajn aferojn kune.

– Ĉu vi scias, ke en tiu lernejo la gelernantoj kreas ankaŭ multajn belajn spektakletojn? – demandis Scivolemulido.

– Mi mem povis spekti lastatempe du belajn spektaklojn de marionetoj pri la amikeco. Mi volonte rakontos al vi unu el ili, kiun kreis Cloé, Damien kaj Eliana. Jen ĝi:



La amikoj

Maksimo: – Rigardu kiel ŝi vestis sin!

Ambro: – Vi pravas! Ŝi estas malbela!

Danael: – Ĉesu! Vi ne estas ĝentilaj.

Eliza: – Lasu ilin, Danael! Ili estas malbonaj personoj kaj ni povas fari nenion.

Ambro-Maksimo:

– Jes, lasu nin! Ni faras kion ni volas!

Danael: – Ne aŭskultu ilin! Ĉu vi volas esti mia amiko?

Eliza: – Jes, mi ŝatus esti via amiko!

Mi tute ne havas amikojn. Ĉu vi volas, ke ni iru kune en la urbon por aĉetumi?

Danael: – Jes! Ni bone amuziĝos!

Maksimo: – Rigardu kiom bone ili amuziĝas!

Ambro: – Ho, jes!

Ankaŭ mi ŝatus havi tian amikon!

Maksimo: – Ne valoras esti malbona! Ni gajnas nenion per la malboneco.

Ambro: – Jes, vi pravas. Venu, ni petu pardonon al Eliza. Eble ŝi pardonos nin.

Maksimo: – Pardonu nin, Eliza! Ne estas bone kion ni faris.

Ambro: – Ĉu vi kaj Danael volus esti ankaŭ niaj amikoj?

Danael-Eliza: – Jes! Volonte!

Eliza: – Mi pardonas vin.

Ĉiuj: – La amikeco estas vere granda valoro! La amiko estas persono, je kiu vi povas havi konfidon.



Rolantoj: Ambro, la abelo, Maksimo, la hundo, Danael, la drako kaj Eliza, la anaso.



– Jes, – diris Entuziasmulido – la amikeco estas vere granda valoro! Kaj mi demandas min, ĉu 50-jara amiko estas ankoraŭ juna aŭ ne?

– Ho, la juneco ne nepre dependas de la aĝo, multe pli de la saĝo, de la sentoj en la koro kaj de la pensoj en la kapo. Estas iuj, kiuj restas junaj ĉiam, je iu ajn aĝo.

Kiel nia kara “Juna Amiko”, kiu malgraŭ sia naskiĝdatreveno, restas juna, bela kaj refreŝiga por siaj legantoj.

La gelernantoj de la lernejo La Granda Ursino deziras tre feliĉan 50-an datrevenon al nia eterne *Juna Amiko* per tiu ĉi bela bildo. Feliĉon kaj longan vivon al *Juna Amiko*!



*/La respondo al la demando pri la konstru-elementoj estas: 1793!
Ĉu vi estis proksima al tiu nombro? Se jes, gratulojn!/*




Louis Pasteur (1822 -1895)

Patro de vakcinado!

Dum la lastaj jaroj la tuta mondo estis trafita de kovimo, antaŭe nekonata malsano, kaŭzita de la kronviruso (el Vuhano).

Por protekti la homaron multaj laboratorioj tra la mondo esploris (kaj trovis) vakcinojn. Sed ĉu vi scias, kiu lanĉis vakcinojn? Temas pri la franca sciencisto, kemiisto kaj fizikisto Louis Pasteŭr (*Lui Paster*) fine de la 19-a jarcento.

La filozofo Pierre Charbonnier (*Pjer Ŝarbonje*) tiam skribis, ke “potenciale, ĉiu estas por alia infekta fonto; malsano estas kolektiva respondeco, la plej konkreta bazo de solidareco, kiu ekzistas inter ni”. Tiuj vortoj ne malmodiĝis kaj restis gvidlinio por multaj registaroj dum la epidemio, eĉ se kelkaj, nome de persona libereco, rifuzis, kalkulante, ke ĉar la aliaj faros, ili mem estos protektitaj.



Esploristo pri bestaj malsanoj

La barono Haussmann (kiu rekonstruis Parizon kun larĝaj avenuoj) kreis komisionon pri ĥolero, danĝera malsano, kiu transdoniĝis per malpura akvo, dum en 1865 sciencistoj serĉis la kialon en la aero. La mikrobo estis konata danke al la laboroj de Pacini en 1854, kaj Snow jam montris, ke la kontaĝa ilo estas en la akvo... Li esploris la malsanon de la silkovermoj, trovis vakcinon kontraŭ ĥolero ĉe kokinoj, kontraŭ malsano de ŝafoj kaj de porkoj. Li suferis cerboatakon kaj perdis la uzon de la maldekstra mano; de tiam li havis problemojn paŝi. Sed la handikapo ne malhelpis lin plu esplori.

Se li science brilis, liaj politikaj provoj elektiĝi senatano malsukcesis. Li tamen ricevis diversajn premiojn pro la esploroj. En 1882 li eniris la prestiĝan Francan Akademion.

Kemiisto

Pasteŭr naskiĝis en orienta Francio. Li studis en sia regiono, poste en Parizo eniris prestiĝan pedagogian seminarion. Li edziĝis al Maria, filino de la dekanato de la fakultato de Strasburgo. Ŝi, kiel Klara, la edzino de Zamenhof, rezignis pri propra vivo, kunlaboris kun la edzo, skribis tion, kion li diktis, kolektis la aperintajn artikolojn kaj ĝis lia morto en 1910 flegis la bildon de la edzo.

Kiel profesoro pri kemio en la scienca fakultato de Lillo li interesiĝis pri molekuloj¹, poste pri fermentado² dum preparado de biero, poste pri formado de vinagro. Li estis elektita membro de la Akademio de Sciencoj. Poste li malkovris la molekulan nesimetron kaj la nesimetron de la karba molekulo.



Vakcinoj

Vakcino kontraŭ rabio³

Rabio trafas sovaĝajn bestojn (lupojn, vulpojn, hundojn en la naturo) kaj estis konata jam en la 16-a jarcento. En 1881 la viruso estis identigita ne nur en salivo, sed ankaŭ en cerbo de kuniklo. En 1880 Pasteŭr konstatis, ke uzante malnovajn mikrobojn oni malgrandigis la povon de la viruso, sekve kokinoj ne mortis pro ĥolero, nur malsaniĝis. Tiel naskiĝis nova tipo de vakcino. La 6-an de julio 1885 la juna knabo Joseph Meister /*Josef Majster*/ estis mordita de rabimalsana hundo. Post vakcinado li ne mortis pro rabio. Oni povas imagi la emocion ĉe la familio, ĉe la kuracisto mem kaj ĉe la esploristoj. Sed tiu unua sukcesa eksperimento ĉe homo naskis la tutmondan prestiĝon de Pasteŭr.

Sintez-kapablulo

Laŭdire Pasteŭr nenion malkovris: li simple havis grandan kapablon sintezi⁴ kaj alproprigi rezultojn de la esploroj de aliaj sciencistoj. Li refutis la spontanegan generigon: neniun vivantaĵon naskiĝas el nenio, sed venas de io. Por elimini mikrobojn, bakteriojn kaj virusojn, li konstatis, ke sufiĉas varmigi vinon ĝis 57°C por la vino, sed uzis ĝin por la lakto, kiun necesis boligi ĝis 100°C. Tiu procezo nomiĝas pasteŭrizado, simpla nompreno de la inventinto. Ankaŭ antisepto⁵ ŝuldiĝas al li: mikroboj troviĝas en aero kaj akvo, sekve necesas “purigi” la vundon. Same asepto⁶, por ke ne estu mikroboj en la ĉirkaŭaĵo. Li konkurencis kun la germano Robert Koch (1843-1910), kiu ankaŭ malkovris bacilon de ĥolero, kaj bacilon de



tuberkulozo en 1882, sed ni ne forgesu, ke en 1870 militis Francio kaj Germanio. Ĉiu scias, ke se scienco ne konas landajn limojn, sciencistoj ilin konas.

Institutoj Pasteur tra la mondo

Dum sia vivo Pasteur ricevis multajn premiojn, medalojn kaj rekompencojn. Kiam li mortis, okazis nacia funebra ceremonio en Parizo, eĉ se la familio rifuzis, ke li eniru Panteonon, kie kuŝas brilaj homoj. En 1888 estis fondita Instituto Pasteŭr, ĉar “necesis protektantaj institucioj, kiuj tradukis mikroban solidarecon per edukado kaj prevento”. Nun ekzistas en la mondo 32 tiaj institutoj, kaj ties esploristoj ricevis 10 nobelpremiojn. Ekzemple oni vane esploris pri vakcino kontraŭ la malsano AIDS, ĉar la viruso estas tro ŝanĝiĝema kaj adaptiĝema. Sed ni ne perdu la esperon. Vakcinado kontraŭ infanmalsanoj jam savis milionojn da infanoj, eĉ se, bedaŭrinde, iuj ankoraŭ estas trafataj de tiuj malsanoj (ekz. morbito⁷, ĉar mankas mono aŭ kuracistoj). Ni konkludu per tiu frazo de Pasteŭr: “Hazardo favorigas inventadon nur ĉe spiritoj jam preparitaj al esploroj post longaj studoj kaj persistemaj streboj”.

Renée Triolle

triolle.renee@wanadoo.fr

1) **Molekulo**: la plej malgranda ero de kemia korpo; 2) **Fermentado**: kemia procezo ĉe organika substanco; 3) **Rabio**: mortiga infekta malsano; 4) **Sintez**: kombini, malanalizi; 5) **Antisepto**: detruo de infekta mikroboj; 6) **Asepto**: procedo en kirurgio kontraŭ infektantaj ĝermoj; 7) **Morbilo**: infekta febro kun haŭtaj ruĝaĵoj (“butonoj”).



Porinfana Libroludilo

Komentoj pri “Tri knaboj, Krepuskulino kaj Terurul” de Eva Vychodilová, esperantigita de Petr Chrdle, kun ilustraĵoj de Miroslava Zezulová. Eldonejo Kava-Pech 2020. ISBN 978-80-88326-06-9, 12 kartonaj paĝoj.

Tiu ĉi libro havas kovrilojn el malmola malfleksebla kartono kaj ses foliojn el malmola fleksebla kartono.

Ĝi estas bindita per forta drato, tiel ke la infanoj povu manipuli ĝin facile por rigardi la belegajn ilustraĵojn ene de ĝi. Entute ĝi povas funkcii ne nur kiel libro, sed ankaŭ kiel bela ludilo, ĉar la infanoj verŝajne ĝuos trafolumi ĝin kaj imagi la protagonistojn en diversaj situacioj.

Sur la fronta kovrilo videblas la portreto de la koboldo Terurul, pri kiu oni ne povas diri certe, ĉu li ridetas aŭ grimacas. Legante la rakonton, ni ekscias, ke la tri infanoj, kiuj perdiĝis nokte en arbaro, tre ektimis vidante lin. Tamen evidentiĝis, ke la renkonto estis fakte bonŝanca.

Ankaŭ Krepuskulino estas ambigua (*plursenca*) fabela protagonisto, kiu ŝajnas ege danĝera, sed poste evidentiĝas, ke fakte ŝi estis bonintenca.

La ilustraĵoj estas atentokaptaj, kapablaj inciti la scivolon kaj imagpovon de la infanoj. La simpla rakonto estas duone realisma kaj duone fabela. La infanoj povas facile rememori ĝin kaj eventuale “aktori” laŭ ĝi dum siaj ludoj, daŭrigante mense la aventurojn de la libro. Ili povas ekzemple ludi en sia propra apartamento kaj imagi, ke ili estas perditaj en densa arbaro, kie ili renkontas la strangan maljunan Krepuskulinon kaj la koboldon Terurul...

Fine de la rakonto la triopo revenas al siaj gepatroj. La lasta paĝo finiĝas tiel: “Tio estis verŝajne la plej granda aventuro, kiun

Tri knaboj, Krepuskulino kaj Terurul

Eva Vychodilová

Ilustraĵoj
Miroslava Zezulová



K A V A – P E C H

ili iam travivis kaj kiu povis finiĝi malbone. Tial la knaboj promesis, ke venontfoje dum la peladkaŝludo ili bone atentus, ke ili ne forkuru tro malproksimen por ne perdiĝi, ĉar nun ili jam sciis, kiel malbone tio povus finiĝi, se ili denove perdiĝus en la arbaro. Ili ja havis grandan bonŝancon, ke ili feliĉe forlasis ĝin. Kaj kvankam Terurul estis afabla, la restadon en la sako de Krepuskulino ili neniu-okaze volus ripeti, kaj ankaŭ ili neniam plu volus vidi siajn panjojn tiom plorantajn.”

Do la rakonto celas konvinki la infanojn, ke estas danĝere vagadi solaj ekster la domo kiam noktiĝas, kaj ĉiuokaze estas tre riske malobei la saĝajn konsilojn de la gepatroj. Tamen en tiu ĉi libro troviĝas ankoraŭ unu mesaĝo, kiun la infanoj povos rememori eĉ kiam ili estos plenkreskuloj kaj kapablos decidi memstare pri siaj agadoj. Verŝajne eĉ tiam utilos pensi, ke ne indas prijuĝi personojn laŭ la unuaj impresoj, nek pritaksi cirkonstancojn tro haste.

Luiza Carol



Legu kaj ĝuu

Rubrikestro:

Małgosia Komarnicka

Pollando

malgosia.junaamiko@gmail.com



Tutmonda ĉefurbo de la libro en la jaro 2022

Legante ĉi tiun rubrikon vi jam scias, ke ĉiun jaron, la 23-an de aprilo, oni festas Mondan Tagon de la Libro kaj Aŭtoraj Rajtoj.

Ĝia kreinto estas la hispana eldonisto Vicente Clavel Andrés kaj la bela ideo naskiĝis en Katalunio, en Valencio, en la jaro 1926.

Nun la Ĝenerala Konferenco de Unesko proklamas ĉi tiun feston kaj atribuas la titolon “la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro” ĉiujare al alia urbo de la mondo. Tiel Unesko agnoskas la kvaliton de kulturaj programoj, la disvastigon de legado de libroj kaj eldonejan industrion en elektita urbo.

Madrido estis la unua urbo, kiu ricevis ĉi tiun titolon kaj ĉi-jare la meksika urbo Gvadalaharo (hispane *Guadalajara*) fariĝis la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro. Ĝi estis elektita pro sia “strategia projekto”, eluzi libron kiel ŝlosilan elementon de la socia transformiĝo – konstruo de packulturo, instigo de socia progreso kaj venkado de perforto. Aprile okazas ankaŭ alia grava festo, la Internacia Tago de Libro



por Infanoj. Fondis ĝin en la jaro 1967 IBBY (*The International Board on Books for Young People* – Internacia Ĵurio Pri Porinfanaj Libroj). Ĉiujare la 2-an de aprilo, okaze de la naskiĝtago de la dana fabelaŭtoro Hans Christian Andersen, en alia lando oni festas tiun tagon, organizante interesajn programojn. La celo de tiuj programoj estas disvastigi infanlibrojn kaj subteni legadon de infanoj, sed ankaŭ stimuli junajn talentojn. Tial

ĉiujare la organizantoj atribuas specialan premion Hans Christian Andersen Medalo. Ĝin ricevas elektitaj junaj verkistoj kaj ilustrintoj de porinfanaj libroj. Tiu premio estas unu el la plej gravaj internaciaj premioj je la porinfana literatura branĉo.

Ĝia alta protektanto estas la dana reĝino Margareta la 2-a. La premio estas honora – ora medalo kaj ne mono, kaj ĝi ofte estas nomata “Malgranda Nobel-Premio”.

Ĉi-jare la Internacian Tagon de Libro por Infanoj organizas Kanado kaj ĝia moto estas: “Historioj estas flugiloj, kiuj helpas leviĝi ĉiutage”.

Legado estas tre grava, legu multe, ĉar nia cerbo, simile kiel muskoloj, bezonas intensan gimnastikon.



Klubo de bona libro

Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas danke al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo, sendu al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de Juna Amiko.

Rekomendo

Por la Biblioteko de *Juna Amiko* Teresa Sibilak, esperantistino kaj instruistino de Esperanto el Pollando, rekomendas al vi la novelaron “Kie boacoj vagadas” de la finna Esperanto-verkistino Eija Salovaara. La libron eldonis Dansk Esperanto-Forlag en la jaro 1967.

La libro konsistas el naŭ noveloj, kiuj rakontas pri la homa vivo en la plej norda parto de Finnlando, nomata Laplando. Laplandon kreas la plej nordaj regionoj de kvar landoj, Norvegio, Finnlando, Svedio kaj Rusio. Hodiaŭ tiu regiono nomiĝas Sameio aŭ Sameujo.

La stilo de la aŭtorino estas komprenbla eĉ por komencantoj kaj dank’ al tio, legante ni “vidas” tiujn kolorplenajn vastajn ebenaĵojn, belecon de sovaĝa kaj majesta naturo aŭ senlimajn neloĝatajn praarbarojn. En la libro vi povos legi ankaŭ pri superstiĉoj de la loĝantoj de tiu regiono.

Al mi tre plaĉis la lasta novelo “Kiel Magga savis sian patrino”. Ĝi priskribas indiĝenan laplandan familion. La dekjara Magga en boato, nokte dum ŝtormo kuraĝe remis trans lago, por alvoki helpo por sia malsana patrino.



Mi rekomendas la libron precipe al tiuj, kiuj ŝatas vagadi, ekskursi al neordinaraj lokoj kaj ekkoni nekutimajn homojn.



Blazono de

Vroclavo






Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo

Konkurso ne nur por junaj legantoj.

Ĉi-foje mi deziras prezenti al vi du polajn urbojn, kiuj situas en la regiono de Malsupra Silezio kaj ili estas Vroclavo kaj Jelenia Góra.



En ĉi tiuj urboj inter la 23-a kaj 27-a de julio okazos la 5-a INTERKULTURA JULIRENDEVUO. Dum ĝi ni festos jubilean jam la 10-an Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj kaj 135 jarojn de Esperanto. Abunda programo konsistas el prelegoj, laborsesioj, AMO-seminario, dancvesperoj, ekskursoj, amuzaĵoj...

Ni komencos en Vroclavo, la 23-an de julio kaj finos en Jelenia Góra, la 27-an de julio (ĉiaj informoj: informado.eo@gmail.com).

Unue per kelkaj informoj konatiĝu pri la lando. Klopodu trovi la menciitajn en la teksto lokojn sur la mapo kaj poste tralegu la legendojn kaj faru konkursajn taskojn.

Kio allogas min al Vroclavo kaj al Jelenia Góra?

Vroclavo (pole: *Wrocław*, legu: Vrocŭaf) estas belega urbo de 12 insuloj kaj 134

pontoj, kun riĉa historio kaj neordinara ĉarmo. Ĝi situas en la sudokcidenta parto de Pollando ĉe la rivero Odru kaj estas la ĉefurbo de la regiono Malsupra Silezio. Ĝi estas la kvina laŭ la areo kaj la kvara laŭ loĝantoj la plej granda urbo de Pollando, grava centro de scienco kaj kulturo kaj ofte estas nomata: "la urbo de renkontiĝoj", sed ankaŭ "Norda Venecio".

Laŭ la legendo Vroclavo estis fondita ĉirkaŭ la jaro 1000 fare de la ĉeĥa princo Vratislav la 1-a, kaj ĝi certe estis nomita laŭ lia nomo.

En 2016 Vroclavo estis Eŭropa Kultura Ĉefurbo kaj de 2019 la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro UNESCO. En Vroclavo naskiĝis la Patronino de Eŭropo, Edith Stein.

Iom pri Vroclavo vi povas tralegi en *Juna Amiko*, la numero 1/2019, sed pli detale vi ekkonos ĝin vizitante la urbon dum Julirendevuo, la 23-an de julio. Ni vizitos la urbon kun la gvidlibro "*Spacerkiem po Wrocławiu* – Promene tra Vroclavo", kiu estis eldonita de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado danke al financaj rimedoj de la Urbo Vroclavo.





Pri la gvidlibro en la pasinta numero de *Juna Amiko* skribis Utho Maier.


Jelenia Góra (legu: *jelenja gura*) estas urbo pri multjarcenta tradicio kaj multaj antikvaĵoj. Ĝi situas ĉe la rivero Bóbr (legu: bubr) en Jeleniogorska Valo (pole: Kotlina Jeleniogórska), en la sudokcidenta parto de Pollando, en la regiono Malsupra Silezio. Jelenia Góra estas la turisma kaj kuracloka centro. Ĝi estas ankaŭ urbo kun riĉa kultura provizo: teatro, kinejo, filharmonio kaj multaj festivaloj (ekz. Internacia Festivalo de Strataj Teatroj). La urbon ĉirkaŭas montoj kaj arbaroj, kaj do ĉiu trovos ĉi tie konvenan proponon sendepende de tio ĉu li/ŝi ŝatas ripozi trankvile aŭ aktive.

Unu el la esceptaj allogaĵoj, kiuj valoras rigardon, estas subteraro. Ĝi troviĝas sub la centro de la urbo – ĉ. 5 mil kvadratmetroj.



Historia Urboparto – ĉi tie troviĝas Urboplaco, kiu estas unu el la plej belaj en Pollando. Ĉirkaŭas ĝin 55 multkoloraj brikdometoj. En la centro de la Urboplaco troviĝas Urbodomo konstruita en la 16 jarcento kaj apude estas baroka akvoputo kun statuo de Neptuno. En la Urboplaco troviĝas ankaŭ ŝtonego kun memortabulo dediĉita al la iniciatinto de la lingvo Esperanto Ludoviko Zamenhof.

La plej malnova templo en la urbo estas “baziliko malgranda” de la Sanktaj Erasmo kaj Pankraco. La plej granda templo estas la preĝejo de Suprenlevo de Sankta Kruco – unu el ses troviĝantaj en Silezio tiel nomataj “la preĝejoj de graco”. Valoras ankaŭ ekvidi la defendajn murojn de



“Wojanowska Pordego”, la Kastelan Turon...

Unu el la plej malnovaj polaj kuraclokoj estas Cieplice (legu: *cjeplice*), la kvartalo de Jelenia Góra. La famo de ĉi tiu pitoreska loko superpaŝis jam en la 16a jarcento for de la limo de nia lando.

Dum Internacia Julirendevuo atendas vin multe da allogaĵoj, interalie ni vizitos la urbon, radiostacion KSON, ni aŭskultos prelegojn en la aŭlo, unu el la tri altlernejoj (Ekonomika Universitato, Vroclava Politekniko kaj Gigantmontara Ŝtata Altlernejo). La transporto de Jelenia Góra estas sufiĉe bone kunordigita kun la mondo pere de la sistemo de fervojaj kunigoj, alirvojoj kaj kun la vroclava flughaveno.


Legendoj

Por prezenti la legendon de Vroclavo mi elektis unu el la gvidlibro “*Spacerkiem po Wrocławiu* – Promene tra Vroclavo”. Ĝi nomiĝas “La Pastobula Pordego” kaj instruas nin klopodi plenumi interkonsentojn. La sekva legendo klarigos nomon de la urbo Jelenia Góra.



Ostrów Tumski, la plej malnova antikva parto de Vroclavo





La pastobula pordego



Ostrów Tumski estas la plej malnova antikva parto de Vroclavo. Sur ĝi apud la ĉefkatedralo troviĝas la plej malgranda preĝejo de Vroclavo, la Preĝejo de Sankta Egidio (Supre, *Kościół św. Idziego*). Ĝi estas la plej malnova konservita konstruaĵo de Vroclavo kaj la plej malnova sanktejo, kiu plu funkcias ĝis hodiaŭ en la urbo. Valoras halti ĉi tie por momento, por eksenti la kvieton, kiun ĉi tiu konstruaĵo donas. La preĝejo estas ligita kun la Pastobula Pordego (*Brama Kluskowa*).

Pri tiu pordego ekzistas legendo:

“Proksime al la urbo loĝis kamparana geedza paro, Agneŝka kaj Konrad. Agneŝka mortis pro la ‘nigra morto’ kaj Konrad, estante sola, ne kapablis ordigi sian vivon kaj ofte estis malsata. Iun tagon li kuŝiĝis en la ombro de la preĝejo de Sankta Egidio, por ripozi. Dum la sonĝo vizitis lin lia mortinta edzino. Ŝi decidis helpi al li kaj fari, ke li neniam malsatu. Ŝi promesis ĉiutage kunporti bovlon da pastobuloj kaj Konrad devis nur ĉiam lasi unu pastobulon. Bedaŭrinde, Konrad ne kapablis ekregi sian malsaton kaj forgesis pri la necesa kondiĉo.



La pastobula pordego

Kiam li volis manĝi la lastan pastobulon, ĝi elsaltis el la bovlo, ensaltis en la pordegon kaj tuj ŝtoniĝis. Konrad rompis la postulon kaj devis dum multaj jaroj malsati. La ŝtonigita pastobulo rememorigas pri tio, ke ni klopodu ĉiam plenumi interkonsentojn.”

Legendo pri Jelenia Góra

Ni devas reveni al antaŭaj tempoj, ĝis la 11-a jarcento. La pola princo de la Piast-dinastio, Boleslavo la 3-a Kurbabuŝa, ĉasadis en arbarego ĉe la rivero Bóbr. Kune kun siaj kavaliroj li provis ĉaskapti escepte belegan cervon. Neniu sukcesis, la cervo savis sian vivon. Nokte la princo havis belan sonĝon – li denove ĉasadis kaj denove ekvidis la saman belegan cervon. La cervo montris al la princo belecon de la regiono.

Matene la princo ordonis konstrui sur la altaĵo la fortikigitan kastelon kaj nomi tiun lokon Jelenia Góra (Cerva Monto). Li ankaŭ postulis, ke la setlejo en sia blazono havu grandan kaj fieran cervon. Tiel estas ĝis nun kaj la altaĵo portas nomon de la pola princo.

La konkursa tasko: Kreu almenaŭ 5 demandojn al ĉiuj partoj de la tuta rubriko.

La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko “Konkurso – legendo” ĝis la 30-a de junio 2022 al la adreso: Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej, ul. Kołłątaja 26A, PL- 50-007 Wrocław, Polska.

La valorajn premiojn fondis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (pole: *Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej*).



Monumento memore al Ludoviko Zamenhof en Jelenia Góra



Katmanduo

Jen impresoj de Jean-François Robert, svisa fotisto, biciklisto kaj montgrimpanto.

Per la fingropintoj oni sekvas la dornetojn de la reliefoj de la tamburoj, kiuj konsistigas la preĝajn muelilojn. En la freŝa matena aero de la budhismaj temploj oni flaras la pezan parfumon de la bonodoraj religiaj bastonoj aŭ la dolĉan odoron de la lokaj sukeraĵoj.

Mi admiras la silueton de tiu monaĥo, zorgeme envolvita en sia oranĝ-purpura robo. La bildo estas bela. Oni povus kredi, ke tiu homo estas lokita sur tiu placo, antaŭ tiu templo, kiel statuo. Nur la bruoj tiras min al la realo. La susurado de la kolombaj flugiloj, la ĉirpado de la preĝmueliloj kaj la murmurado de la preĝantaj pilgrimantoj. Mi spiras malrapide, mia rigardo estas veka, atendanta tiajn bildojn, kiuj subite aperas kaj plenigas mian cerbon kaj la memoron de mia kamerao.

Tuj kiam vi forlasas la flughavenon, vi estas plonĝita en la atmosferon de

tiu urbo. Tiu peza varmo, kiu ekkaptas vin kaj kiu malfortigas viajn krurojn, tiu humideco, kiu ĉirkaŭas vin kaj akompanas vin en ĉiuj viaj migradoj... Subite vi trovas vin meze de iu strato, evitanta la veturilojn alvenantajn de ĉiuj anguloj, surdigita de la senĉesaj blekadoj de la hupiloj, kiuj donas ritmon al tiu tro densa trafiko en tiu taghoru. Tiuj odoroj, kiuj maltrankviligas vin, miksaĵo de homa ŝvitado, de fuma elirado, ĉu el konsumigantaj oferoj aŭ brulantaj rubaĵoj... Ĉio estas nova, surpriza... La koloroj de la virinaj sarioj, brilaj, la originalaj ornamoj de la kamionoj, la aldonaj ekipaĵoj de la bicikloj, de la rikiŝoj ĝis iuj geniaj cikloj por transporto diversaj... Grupo de saduoj (asketismaj praktikantoj de la hindua religio) invitas min por gustumi semojn rostitajn sur karboligna fajro. Mi kaptas ilian rigardon, kiu atenteme observas min. Ili ridas inter si, ĉar ili konstatas mian hezitemon. Mi akceptas manplenon de arakidoj kaj eksidas proksime de ili. Ili volas tuŝi mian kameraon kaj sugestas, ke mi fotu ilin... kontraŭ kelkaj rupioj kompreneble. Ni interŝanĝas kelkajn anglajn vortojn. Ili volas scii, kial mi registras bildojn kaj kiu estas mia ŝtataneco. Mi forlasas ilin kun danko kaj plu promenadas en la direkto de la funebraj fajroj. Mi aŭdas, kiel ili ridas, malgraŭ la krioj de la simioj, kiuj serĉas ĉe la turistoj kelkajn bonvenajn sukeraĵojn.






Du filmo-scenaroj

Intervjuo kun José de Jesús Campos Pacheco pri: “Lud-dancejo kie la nokto ne finiĝas” de José de J. Campos Pacheco kaj Ramón Gómez Gaytán, elhispanigita de José de J. Campos Pacheco, eldonita de MAS (2016) kaj “Legendo pri linko” de José de J. Campos Pacheco kaj David Alonso Pupo (dulingva eldono en Esperanto kaj la hispana), elhispanigita de José de J. Campos Pacheco, Eldonita de MAS (2018). Dua parto, daŭrigo el la antaŭa numero.

Luiza Carol: En “Legendo pri linko” aperas citaĵo el la fama kuba poeto José Martí. Bonvolu diri kelkajn vortojn pri tiu poeto kaj komenti iom pri la citaĵo, por tiuj legantoj de *Juna Amiko*, kiuj (same kiel mi) ankoraŭ ne konatiĝis kun liaj verkoj.



JJCP: En pluraj libroj mi prezentas citaĵojn de la nacia heroo José Julian Martí Perez (1853 – 1895). Martí ekde sia juneco malamis la hispanan armeon kaj batalis kontraŭ ĝi. Li batalis por la Kuba sendependiĝo, ĉar en tiu tempo Kubo estis Hispana kolonio. Kubanoj konsideras lin kiel sian nacian heroon.

Martí estas unu el la plej gravaj verkistoj de Kubo. En la jaro 1889 li aperigis la infanrevuon “La ora aĝo”, kiu havis nur kvar numerojn.

La fabeloj, kiuj aperas en la libro “La ora aĝo” (1889), verkita de Martí, estis tradukitaj Esperante okaze de la UK de 1990, kiu okazis en Kubo. Mi elhispanigis “Fingruleto”, kiu aperas en mia libro “Kubaj infanrakontoj”, eldonita de MAS en 2008.

Jen kelkaj pensoj de Martí pri la infanoj:

- Sen knabinoj ne eblas vivi, kiel la tero ne povas vivi sen lumo.

- Infano, ekde kiam ĝi povas pensi, devas pensi pri ĉio, kion ĝi vidas.

- Infanoj devas kunveni unufoje semajne por vidi, al kiu ili povas fari ion bonan.

[* Pli da informoj pri Martí aperas en *Juna Amiko* de aprilo 2007, paĝoj 16 kaj 17 kaj en la *Esperanta Vikipedio*.]

LC: Ĉu vi planas verki ankaŭ alia(j)n scenaro(j)n pri gejunuloj? Mi faras tiun demandon, ĉar mi aprezas viajn scenarojn pro iliaj edukoplenaj mesaĝoj, kaj do mi kredas, ke indus daŭrigi ilin. Al mi ŝajnas, ke vi klopodas prezenti buntajn aspektojn el la vivoj de gejunuloj, kaj interesus min, kiel vi pritraktus ankaŭ aliajn aspektojn estonte.

JJCP: Mi ankaŭ verkis du pliajn librojn, kiujn MAS eldonis: “Animoj en ludo” kaj “Ne kredu ĉion” estas scenaroj por junuloj pli ol 18-jaraĝaj. Mi verkis antaŭe “Kolora Mondo”. Tiu verko estas por infanoj kaj aperis sur la paĝoj de *Juna Amiko*. La verko estas mia unua kontakto kun fabelo, kiu daŭrigas la travivaĵojn de koboldoj kaj magiaj bestoj




en Esperantujo. Sed jam mi preparas por junuloj surprizon – ... kiun ili devas atendi.

LC: La protagonistoj de ambaŭ filmoj havas komunajn ŝatokupojn kaj pasiojn, kiel ekzemple piedpilkon, muzikon, aktoradon, pentradon, karateon, tajŭandon, dancadon ktp. Ili ankaŭ ŝatas ekskursi meze de la naturo kaj iri al la plaĝo. Kion pri Esperanto? Eble en venonta(j) scenaro(j) aperos ankaŭ Esperanto kiel komuna pasio de kelkaj gejunuloj, ĉu?

JJCP: Mi planas daŭrigi la verkadon de tiaj scenaroj kaj aperigi ankaŭ scenaron, kie niaj rolludantoj ekkonos esperantistajn junulojn en tendaroj...

LC: Vi prezentas kritike diversajn malvirtojn de gejunuloj, kaŭzatajn de nesufiĉe efika edukado. Ekzemple, en la scenaroj aperas la malbonaj rezultoj de agresemo, drinkemo, vetludado, malseriozezo rilate seksajn rilatojn k.a. Ĉi-rilate mi multe aprezis la vortojn de unu protagonisto (Lisenjo), kiu diras: “Paro estas komprenemo, respekto kaj amo.” Unu el la protagonistoj estas knabo, kiu eĉ malsaniĝas pro nesufiĉa kono de la danĝeroj, kiujn implicas seksaj rilatoj. Ĉu en estonta scenaro vi prezentos ankaŭ la problemojn, kiujn alfrontas knabinoj tiurilate? Mi demandas tion, ĉar mi vidis multajn gejunulojn, kiuj komencas tre frue seksajn rilatojn, en aĝo, kiam iliaj korpoj ja estas taŭgaj por tio, sed iliaj mensoj ne estas sufiĉe maturaj, por ke ili fariĝu patrinoj aŭ patroj. Kaj tiuj, kiuj plej multe alfrontas tiun malkongruecon, estas verŝajne la knabinoj, en kies vivoj povus aperi gravaj kaj dolorigaj dilemoj. Verŝajne pli efika edukado pri sekso povus parte malplii tiajn dilemojn de junaj virinoj. Kion vi pensas pri tio?

JJCP: Kutime la junuloj kaj adoleskantoj suferas miskomprenon de pliaĝuloj kaj kelkfoje ili ne konfidas al la gepatroj “problemojn” pri ĉio, kion ili alfrontas



ĉiutage. En Kubo estas multaj edukaj projektoj kun junuloj kaj ili vizitas klubon pri seksa edukado. En tiu projekto partoprenas psikologoj, kiuj instruas pri tio, kiel oni konduki. Mi pripensas plu verki pri vivoj kaj sentoj de junuloj. Multaj aspektoj pri tiu temo ekzistas ĉirkaŭe. Kiam mi verkis “Lud-dancejo kie la nokto ne finiĝas”, la drinkado de alkoholo estis unu el la ĉefaj dilemoj de la scenaro. Kelkaj ideoj alvenos por venontaj scenaroj, ĉar ĉiam

estas io nova, por malkovri pri la junulara kaj adoleskanta etapo, ĉu ne? Dum tiu eduka babilado, kie junulo partoprenas kaj la psikologoj gvidas, kelkfoje estas interesaj lecionoj pri seksaj malsanoj, antaŭjuĝoj, primokadoj kaj ĝiaj suferoj, junularaj devoj kaj rajtoj ktp. En Kubo estas domo (FMC), kiu respondecas pri defendo de la virinaj rajtoj. La knabinoj, junulinoj, havas gravajn rolojn en nia socio kaj ricevas protekton de la ŝtato. (Pri tiu temo mi verkos estonte.)

LC: En viaj scenaroj aperas kelkaj aspektoj de la malbonaj influoj, kiujn malvirtaj fremdaj turistoj havas sur naivajn gejunulojn de Kubo. Eble en estonta scenaro aperos ankaŭ la influoj de esperantistaj fremdaj turistoj, ĉu? Mi esperas, ke tiaj ĉi influoj estas bonvenaj... Kion vi opinias pri





tio? Eble aperos ankaŭ informoj pri la du tre sukcesaj universalaj kongresoj, kiuj okazis en Kubo, kaj ĝenerale pri la noblaj interkulturaj celoj de la esperantista turismo...

JJCP: Kubo estas tropika insulo kaj someras dum la tuta jaro. Varadero estas unu el plej belaj plaĝoj de mia lando. Vere, turistoj alvenas ĉiujare kaj estas punita en mia lando la seksa rilato inter turistoj kaj naivaj junulinoj, kiuj por mono vendas sin al eksterlandanoj.

Sed oni povas babili kun turistoj, kiuj promenas surstrate kaj amikiĝi. Esperantistoj el aliaj landoj vizitas nin kaj multaj junuloj kondutas kiel saĝaj kaj bone edukitaj uloj. Oni parolas pri arto, scienco, sporto, pri urboj ktp. En la du Universalaj Kongresoj multaj junuloj amikiĝis. Alvenis junuloj el multaj landoj. Amikeco, paco, komprenemo kaj solidareco inter popoloj estas nia slogano.

LC: Ĉu vi intencas subtitoli la filmojn en Esperanto?



JJCP: Jes, eblas subtitoli la scenarojn, sed ne ĉiuj scenoj, kiuj aperas en la libroj, estis filmitaj.

LC: En la komenco de “Legendo pri Linko”, la protagonistoj respondas al intervjuo de radioraportisto pri imaga scenaro, en kiu ili aktoris. Ĉu la intenco de tiu sceno estas rimarkigi, ke la gejunuloj fakte rekonas sin mem kaj siajn kunulojn dum la aktorado? Ĉu tio montras la verisimilecon de la scenaro?


JJCP: La intervjuo, farita al la junuloj en la radio, okazas, ĉar tiuj junuloj aktoris antaŭe. David proponis tiun ludon al mi dum la verkado: Imagu, ke lernantoj aktoras kaj samtempe la rolludantoj de la verko ankaŭ aktoris en imaga scenaro. Povas esti, ke vi iomete pravas Luiza, kiam vi demandas min pri tiu komenca sceno.

LC: Ĉu vi volas aldoni ion pri tiuj du libroj aŭ/kaj alia(j)n mesaĝo(j)n por la legantoj de *Juna Amiko*?

JJCP: Mi volas danki vin Luiza pro tiu ĉi intervjuo kaj mi proponas al esperantistoj de aliaj landoj surscenigi tiujn verkojn, aŭ filmi ilin. Mi permesas al vi ŝanĝi la vorton “Lud-dancejo”; ĝi povas esti nur “Dancejo”. Mi nur volas, ke oni sciigu min pri tiu filmado, se eblas.

Mi finas la intervjuon, sendante pacan mesaĝon al ĉiuj junuloj tra la mondo.

LC: Dankon pro viaj tre interesaj respondoj. Mi tutkore deziras al vi sanon kaj sukceson en viaj estontaj laboroj.



Rubrikestro:
Elena Nadikova,
la gvidantino
de Esperanto-klubo
“Betuleto”, Rusio.
lena_espero@mail.ru



Ukrainio esperas...

Saluton, karaj legantoj!

Ĉiuj scias, ke Esperanto estas paca lingvo. Ĝi servas por internacia kaj interkultura komunikado. Oni uzas ĝin por paroli, por korespondi, por labori.

En Esperanto homoj okupiĝas pri scienco, pri ekonomio, pri naturo. Oni vendas librojn en Esperanto. Oni kantas en nia lingvo. Oni vojaĝas pere de ĝi. Do, neniam Esperanto servis kaj – ni certas – servos al malbono, al perforto. *Male, nur por prospero kaj unuigo de homoj.*

Nia rubriko jam rakontis pri multaj ekzemploj de utila uzo de nia unika lingvo. Ĉi-foje ni iom prezentos sciencajn kaj instruatajn Esperanton.

Temos pri Ukrainio. En ĝia okcidenta parto ekzistas la urbo Lucjk (Lucko). Ĝi estas antikva, bela urbo kun riĉa

historio, la ĉefurbo de la Volinia regiono de Ukrainio. *Juna Amiko* jam prezentis ĝin en la unuaj publikaĵoj de *Interkultura Mondo* antaŭ 15 jaroj. Nun ni daŭrigas la prezenton.

En la Volinia nacia universitato je la nomo de la fama verkistino Lesja Ukrainka en Lucjk jam de multaj jaroj ekzistas Esperanto-centro. Gvidas ĝin nia samideanino, profesoro Nina Danylyuk. Ŝi estas aktiva membro de ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, estro de la ukraina ILEI-sekcio, ano de la Universitata laborgrupo de ILEI. Tiu grupo unuigas Esperanto-movadon en diversaj altlernejoj tra la tuta mondo. *Interkultura Mondo* ĉi-numere disponigas siajn paĝojn al la rakonto de Nina pri la tradicioj kaj nuntempo de la Esperanto-instruado en Ukrainio:

«Instruado de Esperanto en Ukrainio havas longan tradicion, kiu startis fine de la 19-a – komence de la 20-a jarcento. Oni lernis internacian lingvon en Esperanto-



El la librokolekto en la universitata Esperanto-centro.



La partoprenantoj de la scienca projekto "Lesja Ukrainka en la mondo de tradukoj".





rondoj en la urboj Odesa (1889), Lviv (1906), Kijiv (1910). La unua lernolibro por ukrainoj aperis en la jaro 1907. La unua Esperanto-revuo “Ukraina stelo” estis eldonita en la jaro 1913. Sed en la jaro 1914 venis la Unua Mondmilito, kiu haltigis la procezon.

En la 20-30-aj jaroj de la pasinta jarcento aktivis Esperanto-kursoj en la urboj Ĥarkiv, Kijiv, Odesa. Tiam ankaŭ aperis novaj lernolibroj kaj vortaroj. Tamen fine de la 30-aj jaroj multaj esperantistoj estis prizonigitaj kiel viktimoj de reprezalioj de la tiama reĝimo de Stalin. Inter ili estis fama poeto kaj tradukisto Eŭgeno Miĥalskij. En la jaro 1939 venis la Dua Mondmilito kaj ne eblis plu okupiĝi pri Esperanto.

E-instruado en Ukrainio renoviĝis en la 60-80-aj jaroj de la 20-a jarcento. Aperis lernolibroj kaj vortaroj, novaj kursoj en la urboj Kijiv, Lviv, Ĥmelnickij k.a. Estis eldonataj revuo “Tra Soveta Ukrainio”, tradukoj de la ukrainaj



Dum la prelego por ĝelernantoj en la universitata Esperanto-centro.

kantoj kaj fabeloj, tradukitaj verkoj de la ukrainaj klasikuloj Taras Ŝevĉenko kaj Lesja Ukrainka, legendoj de la E-verkisto kaj pedagogo Vasil Eroŝenko. Multe faris por tio verkistino kaj tradukistino Nadija Andrianova-Hordijenko. Esperanto estis instruata en la kursoj por komencantoj ĉe la urbaj kluboj.

Granda aktivigo de Esperanto-instruado okazis en la 90-aj jaroj, kiam Ukrainio fariĝis sendependa ŝtato (1991). En la jaro 1990 estis fondita Ukrainia Esperanto-Asocio, kiu havis instru-metodikan fakon. Danke al Volodimir Pacjurko, Mikola Voloŝin kaj aliaj oni renovigis la eldonon de la revuo “Ukraina stelo”. Aperis la lernilo “Ŝlosilo al Esperanto (ukraina)”, “Ukraina Esperanto-vortaro-minimumo”, “Esperanto: lernolibro de internacia lingvo (laŭ Zagreba metodo)” (Viktor Pajuk) k.a. Esperanto-kursoj funkciis en multaj regionaj urboj kaj en la ĉefurbo Kijiv.

En la jaro 2000 estis fondita ukrainia sekcio de ILEI sub gvido de Nina Danylyuk. Ŝi preparis la programon de fakultativaj kursoj por lernejoj kaj gimnazioj, kiu estis aprobita en Ministerio pri Klerigo. Esperanto estis instruata en la liceo № 38 en Kijiv (sub gvido de Mikaelo Lineckij) kaj en la gimnazio № 21 en la urbo Lucjk (gvide de Nina Danylyuk). Aperis “Granda Esperanta-Ukraina Vortaro” (preskaŭ 80 000 vortoj), kiun kompilis Volodimir Pacjurko kaj eldonis Eŭgen Kovtonjuk. Por Esperanto-instruado



La studentino Tetjana Karpiv prezentas la poemon de Taras Ŝevĉenko en Esperanto.



helpis “Ora libro de Esperanto: plena lernolibro de internacia lingvo” kaj “Esperanto per rekta metodo” de Stano Marček, tradukita al la ukraina lingvo fare de Mikaelo Lineckij, reta lernolibro de Andrij Jankovskij k.a. Estis eldonitaj jubileaj verkoj de Taras Ŝevčenko kaj Ivan Franko en Esperanto-tradukoj. Krome estis tradukitaj de Esperanto al la ukraina lingvo verkoj de Ludoviko Zamenhof kaj de aliaj famaj aŭtoroj. La eldono nomiĝas “Verda antologio”, kompilita danke al Viktor Pajuk. Interlingvistiko kaj Esperanto estis instruata en Lesja Ukrainka Volinia nacia universitato, kie funkcias E-centro kun bona kolekto de lerniloj (fare de Nina Danylyuk). En la sama universitato estis lanĉita Internacia projekto “Lesja Ukrainka en la mondo de tradukoj”. Enkadre de ĝi aperis lernolibro por studentoj, en kiu unu ĉapitron formas la pristudoj de E-tradukoj. E-kursojn por komencantoj oni okazigis en la ĉefurbo Kijiv, en la urboj Odesa, Ĥarkiv, Ternopil, Lviv k.a.

La pandemio de la koronaviruso dum la lastaj 3 jaroj malhelpis disvolvigi E-movadon kaj okazigi E-instruadon. Tamen retan E-kurson por emeritoj



Dum la naskiĝtaga festo de Lesja Ukrainka en la Volinia nacia universitato.

sukcese gvidis Svitlana Pohorila (Pogorelaja). Krome rete okazis instru-metodika seminario kaj AMO-seminario. Nova ondo de malfacilaĵoj en Ukrainio ĉijare tute malebligis E-instruadon. Tamen ni esperas kaj sendube certas je baldaŭa renovigo de E-movado en nia lando.»

Kaj tio nepre okazos, kredas *Interkultura Mondo*! Ja Esperanto kiel paca lingvo havas noblajn celojn kaj vere unuigas homojn. Tion oni spertis, ekzemple, dum la internacia ret-kunveno la 15-an de decembro 2021. Ĝin organizis Nacia Scienca Biblioteko en la urbo Odesa. La aranĝo estis dediĉita al la tradicia festo – Tago de Esperanta Libro. Ĝin partoprenis la esperantistoj el Ukrainio, Rusio, Anglio, Kanado...

Do, karaj legantoj, vi vidas, ke evoluo de la homa socio daŭras. Neniuj cirkonstancoj kaj obstakloj kapablas haltigi ĝin. Bono ĉiam venkos malbonon. *Interkultura Mondo* tutcerte kredas je tio! Kaj nia lingvo Esperanto laŭ siaj unikaj ebloj helpas al tio. “Espero” estas ne nur la radiko en la nomo de Esperanto, sed la vojo al paco, interkompreno kaj amikeco!

Interkultura Mondo esprimas koran dankon – kun Espero! – al nia samideanino Nina Danylyuk pro la disponigitaj materialoj!



La studentinoj deklamas la poezion de Lesja Ukrainka.



Esperantaj poŝtmarkoj, eldonitaj en Ukrainio (la pentristo Mikola Vološin).

Mireille Grosjean

Legu kaj parigu!



Desegnu ŝnurojn por parigi la du kongruajn frazpartojn.

En 2021 la registaroj komencas iom post iom okupiĝi pri la klimatsanĝo...

La sveda junulino Greta Thunberg alparolas la registarojn per klaraj postuloj...

Pluvis en Gronlando sur monto kun alteco de 3000 metroj super marnivelo...

Urĝas renovigi domojn por efikigi ilian reziston kontraŭ la ekstera temperaturo kaj tiel ŝpari energion...

La politikaj evoluoj, aprobo de novaj leĝoj, iras tre malrapide...

La aviadiltrafiko estas fonto de aermalpurigado...

Diversaj aŭtokonstrufirmaoj produktas hibridajn aŭ elektrajn aŭtojn...

La urbaj registaroj devus multe labori por konstrui reton de efikaj publikaj transportoj...

... tiel ke homoj povu lasi sian aŭton en remizo aŭ tute rezigni pri uzo de aŭto.

... ĉar tiu situacio de malbone izolitaj domoj kaŭzas grandan parton de la dissendado de karbona dioksido en la aeron.

... tiom, ke la vendo de bicikloj altiĝis enorme.

... tamen antaŭ pli ol 40 jaroj la Verduloj prezentis tiun danĝeran evoluon de la klimato.

... ĉar la publiko iom post iom elektas tiajn vehiklojn. Tamen mankas ankoraŭ pli malgrandaj kaj leĝeraj vehikloj por mallongaj saltoj por unuopuloj.

... kaj multaj junuloj kaj ne nur junuloj samopiniis kaj manifestacias surstrate en diversaj urboj.

... pro tio ni ĉiuj devus uzi trajnojn kaj ankaŭ noktajn trajnojn.

... pro tio diversaj personoj preferas elekti aliajn vojojn kiel civilan malobeon.

... Tio estas pruvo de la klimatsanĝo.

..... SOLVO

En 2021 la registaroj komencas iom post iom okupiĝi pri la klimatsanĝo...

La sveda junulino Greta Thunberg alparolas la registarojn per klaraj postuloj...


Pluvis en Gronlando sur monto kun alteco de 3000 metroj super marnivelo...

Urĝas renovigi domojn por efikigi ilian reziston kontraŭ la ekstera temperaturo kaj tiel ŝpari energion...

... tamen antaŭ pli ol 40 jaroj la Verduloj prezentis tiun danĝeran evoluon de la klimato.

... kaj multaj junuloj kaj ne nur junuloj samopiniis kaj manifestacias surstrate en diversaj urboj.

... Tio estas pruvo de la klimatsanĝo.



... ĉar tiu situacio de malbone izolitaj domoj kaŭzas grandan parton de la dissendado de karbona dioksido en la aeron.



Mireille Grosjean

Kiom stultan ideon mi havis...

Japanio havas surprizon por mi.

Mi kutime vivas en Ĵuraso, svisa kaj franca montara regiono, kie kreskas abioj kaj regas frosto dum vintro. En 1956 mi iris al la lernejo, kiam la temperaturo estis – 35°C! La kutima humideco proksimas je 40%. Mi alvenas al Kioto en julio, mi ŝvitas je temperaturo de ĉirkaŭ 40°C kaj alta humideco, certe super 90%. Mi supreniras al la monto Hiei por vidi la faman templon.



Regas nebulo, oni ne povas vidi en distanco de dek metroj. Venas al mia kapo la ideo: "Vi devas kovri vin, vi frostas...". La temperaturo estas proksima ĉe 40 °C. Fakte mi ne frostas. Sed ĉi tiu konstanta reveno de tiu avertito turniĝas en mia kapo: "Vi devas surmeti pli varman vestaĵon". Tiu frazo aperas dum la tuta vizito en mia menso. Jarojn poste mi finfine malkodigas tiun ĉi fenomenon: en Ĵuraso, kiam estas nebulo, la temperaturo malaltiĝas, tuj fariĝas malvarme. Ĉi tion la profundaj tavoloj de mia cerbo registris. Per vido, nur per miaj okuloj, mia cerbo revenis en la Ĵurasan kuntekston. Ĉu la okuloj, kiuj ne povas vidi je 10 metroj, estas superaj, prioritataj, kompare kun la haŭto, kiu kaptas la veran temperaturon? Ŝajnas ke jes. Stranga fenomeno..., kiu ebligis al mi pli bone kompreni la funkciadon de mia cerbo kaj la gravecon de mia denaska klimato.



➤ La politikaj evoluoj, aprobo de novaj leĝoj, iras tre malrapide...

La aviadiltrafiko estas fonto de aermalpurigado...

Diversaj aŭtokonstrufirmaoj produktas hibridajn aŭ elektrajn aŭtojn...

La urbaj registaroj devus multe labori por konstrui reton de efikaj publikaj transportoj...

Multaj homoj jam komprenas la urĝecon de ŝanĝoj kaj rezignas pri aŭtoveturado...



... pro tio diversaj personoj preferas elekti aliajn vojojn kiel civilan malobeon.

... pro tio ni ĉiuj devus uzi trajnojn kaj ankaŭ noktajn trajnojn.


... ĉar la publiko iom post iom elektas tiajn vehiklojn. Tamen mankas ankoraŭ pli malgrandaj kaj leĝeraj vehikloj por mallongaj saltoj por unuopuloj.

... tiel ke homoj povu lasi sian aŭton en remizo aŭ tute rezigni pri uzo de aŭto.

... tiom, ke la vendo de bicikloj altiĝis enorme.



Oblikva krucenigmo kun kaŝita proverbo



El la libro *107 krucenigmoj en Esperanto* de Stano Marček. La solvon sendu ĝis la fino de junio al redakcio@gmail.com. Unu el la solvintoj (decidos loto) ricevos la libron. Solvo el la antaŭa numero: Vortojn ŝparu agojn faru!

Dekstren malsupren: 1 – Vaz', kest'.

2 – Rusa virnom'. 3 – Ceremoniaj seĝoj.

4 – **Unua parto de la kaŝita proverbo.**

5 – Unu el la ĉambroj de duĉambra parlamento (radiko) – subtera provizej'.

6 – Kriples paŝos – metala elemento (Ir).

7 – Estas neokupita, malplena – plano, skizo – persona pronomo. 8 – Malgranda – deziranta trinki – movi boaton per plataj iloj.

9 – **Dua parto de la kaŝita proverbo** – jarsezono. 10 – Membriĝis – kvina (lasta) parto de la kaŝita proverbo.

11 – Scienc' pri moralo – viraj vestaĵoj – saltanta amfibia bestet'.

12 – Kondiĉa subjunkcio – punkt', kie la ter-akso “trapikas” ter-surfaco – skribis mallongan memorigan resumon. 13 – Efektive ekzistantaj – malgranda lav-purigil'.

14 – Ruslingve “kiu” – surmura papera tegil'.

15 – **Kvara parto de la kaŝita proverbo.**

16 – Kolektoj, sinsekvoj, ĉenoj. 17 – Intenca hom-mortig'. 18 – Kongresa Komitato.

Maldekstren malsupren: 9 – *Esperantista Vegetarano* (inicialoj de la bulteno).

10 – Malmola metal'. 11 – Komencas batalon.

12 – Interne – lasta vorto de preĝoj. 13 – Karakteriza manier' – spec' de poemo. 14 – Denove fariĝis – blafemi.

15 – **Tria parto de la kaŝita proverbo** – tuŝos per lipoj – ekvidu serĉatan aĵon. 16 – Unu part' de konkuro – planti detranĉitan branĉon – internaj.

17 – Aroj da doktrinadeptoj – donacaj' al diaĵo – river' en Rusio. 18 – Centra part' – nom' de dio en la Korano – rilataj al ŝatata kunulo.

19 – Rapidpaŝe moviĝi – kaŭzos la bezonon grati sin – ukraina havenurb'. 20 – Nom' de Jesuo – daŭra son' – instrument'. 21 – Donas havaĵon al nov-edzino – respubliko sur la Araba duoninsulo. 22 – Loĝant' de Japanio – disĵeti grajnoj sur kampon. 23 – Nomo de numeralo – numeralo. 24 – Birdo kun ronda vostplumaro. 25 – Tute samaj. 26 – Kemia simbolo de la metalo stano.


Fokoj kaj rokoj – trezoroj de la marbordo

Ni finis la esploron de la homa pionirado en la okcidenta marbordo de Nov-Zelando, nun ni turnu nian atenton al la bestoj kaj la sovaĝa kaj mirinda naturo.

De Greymouth necesas iri iom suden por atingi la Kabon Malbona Vento (angle: *Cape Foulwind*).



La kabo ricevis tiun nomon de la esploristo Kapitano James Cook, do vi povas imagi la veterajn kondiĉojn, kiam li pasis la lokon en sia velŝipo. Neniu ‘marbordulo’ miros pro la tempesta vetero! Nuntempe eblas tie vidi multajn fokojn, sed mi kapablis bone foti nur unu:



La rubrikon
prizorgas:
Stefan MacGill





Plie facilas multloke vidi pingvenojn kaj aliajn besto-specojn.



La kivio (apterigo) ne estas la sola novzelanda birdo, kiu ne kapablas flugi. Jen bildo de birdo kun la maoria nomo ‘weka’ kiu iĝis ĝia nomo entute:




Irante norden, deviga estas halto ĉe la monde renomaj ‘patkukaj rokoj’ de Punakaiki (vidu la bildojn sur la sekva paĝo). En mia unua vizito al tiu izolita loko (ĉ. 1970) estis apenaŭ unu vojsigno; oni devis trovi propran vojon tra la arbaro kaj la mirinda rokejo estis alirebla sen malhelpoj. Estis afero de la propra mem-zorgo ne fali en blovtruon aŭ plonĝi



80 metrojn en la malpacan kaj ondegan maron. Nuntempe, kiom ŝanĝita estas la situacio. La vojo tra la arbaro estas bone indikita, kun abundo da afiŝoj pri la plantoj kaj arboj videblaj kaj legeblaj. La vojoj tra la rokoj estas limigitaj kaj klare videblaj laŭ rondira vojo, kompletigita

per pli da klarigaj tekstoj kaj eĉ gvid-reloj por ni, malpli mov-kapablaj homoj. Kiom transformis sin la socio kaj la naturo!

En nia sekva numero ni forlasos la marbordon kaj pluirus tra la ravino¹ *Buller* por atingi nian fincelon *Nelson*, en la norda parto de la suda insulo.



Vort-klarigoj:
Pionirado: La agoj de fruaj personoj por eniri novan landon kaj krei vivkapablon.
Kabo: Landpinto, kiu elstare eniras la maron.
Blovtruo: loko, kie la marondoj envenas kaj ŝutas sin supren.
Abundo: Multeco.



Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio, G. P. O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financoj@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrwp@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz*; *cea.polnicky@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; *ahto.siimson@esperanto.ee*. **Finnlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Saïd Balouchi, *said.balouchi@esperanto-france.org*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsofia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** Jozsef Nemeth, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozefo.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de IEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatatjim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *esperoenparmo2020@yahoo.com*. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de IE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **No-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@extra.co.nz*. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tataara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *fidinda@outlook.com*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch_scheidegger@bluewin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.abonoj@gmail.com*.



Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej



NI KORE INVITAS VIN PARTOPRENI EN LA JUBILEA 10-A EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ 2022

Ĝis la 30-a de junio – provaŭdo rete

La 23-an de julio – KONCERTO DE LA PREMIITOJ kaj anonco de rezultoj
– Plac Solidarności 1/3/5 aŭlo, ĉambro 403/1, 4-ra etaĝo (ekde la 14:00)

En la programo ankaŭ
JOMO kaj SUZANA kaj dancgrupoj Gracje kaj Espero



La premioj estos aljuĝitaj por unuaj tri lokoj.
Plie la Ĉefpremio, Aŭtora-premio
kaj Publik-premio

Europejskie
Centrum
Edukacji
Międzykulturowej



ilei



VROCLAVO

urbo de renkontiĝoj

Honora Patronado de la Prezidanto de Vroclavo



Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso : festivalo.eo@gmail.com (skribu en la temo de la mesaĝo: E-kanto) aŭ telefone +48 692 551 131, +48 606 858 640,
www.ecem.com.pl / <https://www.facebook.com/efekantoj/>